La teksto de la kanto:

ĉeĥe:

Nad Moravou svítá a hvězdy zvolna
hasnou,
ta země v barvách žita ti dává radu
jasnou.
Tak hrdě zvedni bradu, od polí k
vinohradům,
potěžkej v rukou číši a poslouchej, co
slyšíš.

Refr:

Moravo, Moravo, ty krásný domove,
tebe bych ubránil i v těžkých okovech.
Moravo, Moravo, ty matko mých dětí,
ty jsi má naděje, láska i prokletí.

Nad Moravou svítá i měsíc zvolna
bledne, kdo její srdce získá, je věrný jen té jedné.
Té jedné rodné zemi nejhezčí mezi všemi,
to, o co tady běží, nechápe, kdo tu nežil.

Refr. 2x



esperante:

Tagiĝos super Moravio kaj la steloj malrapide
velkas,
la sekalkolora tero donas al vi konsilon klaran.
Tiel fiere levu vian mentonon, de la kampoj ĝis la
vinberejoj,
prenu la glason en viajn manojn kaj aŭskultu,
kion vi aŭdas.

Refr:

Moravio, Moravio, vi bela hejmo,
mi vin defendus eĉ en pezaj ĉenoj.
Moravio, Moravio, vi patrino de miaj infanoj,
vi estas mia espero, mia amo kaj mia malbeno.

Tagiĝos super Moravio, eĉ la luno malrapide
paliĝas,
kiu ŝian koron gajnas, estas fidela nur al ĝi sola.
Al tiu sola naskiĝlando, la plej bela el ĉiuj,
Ĉiu, kiu ne loĝis ĉi tie, ne komprenas, kio okazas
ĉi tie.

Refr. 2x

Vilho Suonio Setälä (1892–1985)

de Josef Kříž, Ĉeĥio

Vilho Setälä estis finna ĵurnalisto, fotografanto, esploristo kaj verkisto (li preferis la literaturon de fakto). Li ankaŭ estis multflanka rimarkinda kultura aktivulo eĉ en la internacia Esperanto-movado. Li estis unu el la pioniroj de fotografia arto en Finnlando.

Vilho Setälä naskiĝis la 4an de aprilo 1892 en Helsinko. Li estis edukita kiel docento de

filozofio. Lia patro estis Eemil Nestor Setälä (1864–1935) kaj la patrino Helmi, naskiĝinta Krohn (1871–1967) – finna verkistino kaj tradukistino; ŝi ankaŭ estis redaktistino kaj eldonistino. La patro Eemil Nestor Setälä estis finna politikisto, ŝtatkonsilisto kaj funkciis mallonge kiel prezidanto de la finna senato en 1917, kiam li estis la verkinto de la Finna Deklaro de Sendependeco.



*Medalo okaze de la 120a jubileo
de naskiĝo – averso*



*Vilho Setälä
(1892–1985)*



*Medalo okaze de la 120a jubileo
de naskiĝo – reverso*



Vilho Setälä

(subskribo)



La patro de Setälä estis lingvisto, profesoro pri finna lingvo kaj literaturo en la Universitato de Helsinko de 1893 ĝis 1929. Li havis grandan influon al la studo de la finna lingvo, li estis la fondinto de la esplorinstituto **Suomen suku** (Familio de la finna lingvo) kaj estis la kreinto de la urala fonetika alfabeto.

Ilia filo Vilho (sur la foto) komencis sian fotartokupon per 9 x 12 cm-forma fotilo, kiun li ricevis donace al sia naskiĝtago en la aĝo de 14 jaroj. En 1909 kaj 1912, li partoprenis lingvajn esplorvojaĝojn kun sia patro kaj priskribis vivon en la grekaj regionoj de Vathi kaj Vesta (en la areo de Laconia). Precipe la bildoj de la dua vojaĝo montras liajn fotografajn kapablojn kaj artan vizion.

La akiro de kinofotilo en 1927 inspiris la novajn eksperimentojn de Setälä en kreiva fotarto. Setälä ankaŭ estis tre interesita pri la teknologio de fotarto. Li povis determini la precizan rilaton de lensmalfermaĵo al la kampa profundo de bildo kaj gravuris skalon de akreco sur la surfaco objektivo de Leica fotilo. Li sendis sian aparaton al la firmao Leica (Germanio), ĉar ĝi bezonis riparojn.

Leica kopiis la profundon de kampa skalo, kiun li inventis. Iom poste, ĝi estis gravurita sur objektivaj de ĉiuj pli altkvalitaj aparatoj.

Kiel rekompenco por lia invento, Setälä ricevis inviton al persona vizito al la Leica fabriko kaj eĉ novan fotilon kiel donacon.

En la 1920-aj jaroj, "sendependa grupo de fotistoj" nomita Abiss estis aktiva en Helsinko. Ankaŭ Setälä apartenis al ĝi. En 1930, la grupo Abiss organizis en Helsinko ekspozicion kun eksperimentoj pri arta fotografa esprimo, kiu altiris multe da atento de la ĝenerala publiko. Vilho Setälä malfermis sian propran fotobutikon en Helsinko en 1932 kaj laboris kiel profesia fotisto ĝis 1945. Dum tiu tempo, persona kolekto de pli ol 20 000 filmoj estis kreita en finna historio.

En 1945, Setälä prirezignis profesian laboron en la kampo de fotarto kaj tiam nur registris memorojn de siaj aliaj ŝatokupoj kaj vojaĝoj per sia fotilo. Li interesiĝis pri aliaj fakoj, inkluzive de diversaj proceduroj kaj teknikoj, kaj ankaŭ pri fremdaj lingvoj, precipe Esperanto.

Setälä estis unu el la pioniroj de la internacia lingvo Esperanto en Finnlando. Li lernis Esperanton 15-jara en 1907 kaj aktivis en la Esperanto-movado ekde 1911. Li faris kelkajn kursojn kaj publikajn prelegojn.

Inter 1918 kaj 1922 li estis sekretario de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj en 1934 li fariĝis komitatano de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Li estis membro de la Akademio de Esperanto. Li direktis la Esperanto-Instituton de Finnlando ekde ĝia fondo en 1920 kaj estis la ĝenerala sekretario de la 14-a Universala Kongreso de Esperanto en 1922. De 1955 ĝis 1965 li estis prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando. Li interalie esperantigis la finnan libron **Seitsemän veljestä**, (esp: Sep Fratoj), kies aŭtoro estas Alexis Kivi. Li donacis monrimedojn por fondi Esperanto-Fondaĵon, kiu komencis sian agadon en 1955.

Inter 1935 kaj 1939, Vilho Setälä estis instruisto de fotarteorio ĉe la Lernejo de Arto kaj Metioj. Inter 1918 kaj 1932 li laboris kiel ĵurnalisto ĉe **Kustannus Oy Otava** (la firmao estas la ĝenerala eldonejo de finna literaturo ekde 1890). Li laboris pri pluraj lernolibroj kaj


ankaŭ pri libroj apartenantaj al literaturo de fakto. Li ankaŭ publikigis siajn proprajn informojn kaj lernolibrojn. Lia laboro **Fotografio kiel Scienco kaj Arto** de 1940 daŭre estas unu el la teoriaj kaj praktikaj fundamentoj de tiu kampo en Finnlando.

En la datreveno de lia 90-a naskiĝtago, Vilho Setälä organizis en Helsinko en 1982 ampleksan fotografan ekspozicion, kiu traktis la etapojn de lia tuta 70-jara kariero. En la sama jaro, la finna televidstacio TV1 elsendis dokumentan programon pri li daŭranta preskaŭ unu horon. Vilho Setälä ricevis **Ŝtatan verkistan pension** en 1972 (en la aĝo de 80) kaj la **Ŝtatan Premion por Fotarto** en 1973. La fotografiaj bildoj de Setälä estas en la kolektoj de la Finna Muzeo de Fotarto.

La edzino de Setälä estis verkisto Aini Setälä (1899–1991) ĝis 1955, kaj poste profesoro Hertta Kalkas (1925–2011). Vilho Setälä mortis la 11-an de aprilo 1985 en Espoo en la aĝo de 93. Espoo-urbaŭtoritatoj renomis la straton kie staris la domo kaj kie li mortis (en la distrikto Iirislahti) al la **Esperantotie** (Esperanto-strato) en lia honoro.

Vilho Setälä – verkoj (tre koncize)

- Esperanto Legolibro, 1921
- Enciklopedio de Esperanto (nur participo)
- Plena vortaro Finna-Esperanta, 1919 (revizioj kaj riparoj 1922 k 1934)
- Arto de fotografio, 1929
- Fotografio kiel scienco kaj arto, 1940
- Esperanto-kurso, 1954 (Kurs esperanta)
- Privilegia vojo al lingvoscio Esperanto, 1965



Vilho Setälä, du ekzemploj de rezultoj de lia fotado. Bildoj de kampara vivo:



Koncize pri la medalo kaj pri ĝia aŭtoro

Lando de eldono: Finnlando, kvanto: 500 pc, metalo: latuno, pezo: 245 gr. diametro: 70 mm, diko: 9–12 mm (inkl. reliefo), medalisto: Heikki Varja, produktjaro: 1979. Averso: En la centro: kapo de Setälä, maldekstren en profilo. Margena skribo supera: "KAJ LUKTI FIDELE POR LUMO". Suba skribo: "VILHO / 1892 4.4. / SETÄLÄ". Dekstre inter la skriboj: kvinpinta stelo. Oblikve sub la kolo: H. VARJA / 1979. Reverso: Mondomapo kun la samaspekta arkforma skribo en Esperanto kaj en la finna: "INTERNACIA LINGVO / KANSAINVÄLINEN KIELI" Rando: TILLANDER FINLAND



Heikki Varja (1918–1986) estis finna skulptisto. Lia produktado inkludas plurajn statuojn de finnaj herooj kaj tomboŝtonoj. Aldone al skulptaĵoj, li ankaŭ estas konata pro sia medaljonarto. Li estis premiita la "Pro Finlandia Medalo" en 1963 kaj la "Arta Premio de la regiono Uusimaa" en 1972. En 1980, al li estis premiita la "Medalo de Merito de la Finna Gildo de Medala Arto". En 1983, al li estis premiita la titolo de profesoro.

Helpe de interreto kaj mia arkivo prilaboris kaj esperantigis la tekston.

Josef Kříž, Ĉeĥa respubliko.



Glaciropaj ŝipoj

de **Saliko (Raita Pyhälä)**

Kvankam la klimato mildiĝas, glaciropaj ŝipoj (isbrytare) estas daŭre bezonataj en Skandinavio, Kanado, Usono, eĉ en Argentino. Finnlando havas 8 tiajn ŝipojn.

Krom en glaciropado ili povas helpi en oleokatastrofoj, konstruado de perventa energio – ventomueliloj – en la maro. Kelkfoje ili akceptas turistojn. Por somero ili albordiĝas en Katajanokka/Skatudden en Helsinki/Helsingfors, kie oni povas vidi kaj fotadi ilin.

Tie ili estas prizorgataj, la maŝinojn oni malkonstruas, purigas kaj rekonstruas laŭbezone.

Ĝenerale glaciropa ŝipo povas funkcii kvindekon da jaroj.

Finnlando bezonas siajn glaciropulojn ĉe la plej nordaj havenoj de la Golfo de Ostrobotnio nome Oulu/Uleåborg, Kemi, Tornio/Torneå. Svede tiu regiono nomiĝas Bottenviken. Tie ili helpas kargoŝipojn ĝenatajn de eĉ dumetra glacio kaj de glaciomuroj stakigitaj el glaciopecegoj tien blovitaj per ventegoj.

Duono de la finna kargotrafiko okazas mare. La unuaj finnaj glaciropuloj estis pli mallarĝaj ol la nunaj. La plej malnovaj havas patriotismajn nomojn kiaj **Voima (forto)**, **Sisu (persisto)**, **Kontio**, **Otso (ursoj)**.



Kontio



Otso

Pli novaj estas nomataj pli internacie: Fennica Nordica, Polaris (konstruita en 2016). La dokon en Helsingfors nun posedas Kanada entrepreno Davie.

Svedio havas 6 glaciompajn ŝipojn: Atle, Frej, Ymer, Oden (konstruita en Finnlando), Ale kaj Idun. Ymer en la vintro 2024–2025 helpis nin en Bottenviken. Kutime Svedio uzas siajn glaciompulojn ĉe la havenoj de siaj grandaj lagoj.

Labortago sur la glacirompa ŝipo Sisu

Sisu havas dudek du ŝipanojn, antaŭe 55. Nun la diurno estas dividita en 12 horojn da

laboro kaj 12 horojn da libertempo en la ŝipo. Ĉiu ŝipano laboras 20 tagojn kaj poste liberiĝas kaj elŝipiĝas por 10 tagoj. Onidire la ŝipanaro antaŭe kondukis kaj interparolis malafable kaj krude. La kapitano kaj subkapitano volis izoliĝi de siaj subuloj. Dum la manĝoj ili sidis aparte. Nun jam aperis pli da interkomprenemo kaj la krudaĵoj malpliĝis.

Se la glaciompulo akceptas turistojn, ĝi lasas ilin plonĝi en la vastan maron en akvoimunaj oranĝaj kostumoj kaj amuziĝi kaj senti sin bravuloj en bona vetero.

Nuptofesto en 1885 en Raŭmo, Finnlando

de Raita Pyhälä

Kiam Aina Wesander, filino de riĉa komercisto, kaj markapitano Julius Panelius geedziĝis en la 20a de decembro 1885, la patrino de Aino volis aranĝi festegon.

Ŝi invitis centon da gastoj por la festomanĝo, kiu daŭris preskaŭ ĝis la noktomezo. Pri la ĉefpladoj oni ne mencias en la muzeo sed pri vinoj, dolĉaĵoj kaj fruktoj jes.

Sekvamaten kantemaj gastoj frue vekiĝis por serenadi ĉe la fenestro de la jungeedzoj. Por la festo Aina estis vestita en blanka lana robo, kun krono el mirto kaj oranĝfloroj sur sia kapo. La robon ornamis silkaj ruŝoj.

En la pasintaj tempoj estis tre malbona antaŭsigno, se la krono falis de sur la kapo de la junedzino, ĉar tio povis signifi, ke ŝi ne estis virga. Tia malbonaĵo ne okazis en la festo de Aino kaj Julius.

Por la tagmanĝo sekvatage estis invititaj nur parencoj kaj la 8 geknaboj, kiuj en la antaŭa tago servis kiel akompanantoj kaj servistoj por la junedzino. Nun ŝi portis nigran silkan robon ornamitan per perloj kaj ĉielbluaj plumoj surkape kaj surbruste.

Post la festo la jungeedzoj ekloĝis en tri-ĉambra loĝejo proksima al la hejmo de Aino.



Fotoj faritaj en la muzeo Marela en Raŭmo.

Kiel trovi vivkunulon en la pasintaj jarcentoj

de Raita Pyhälä

En 1721 laŭleĝe la junulojn oni akceptis kiel plenkreskulojn en la aĝo de 21 jaroj kaj la knabinojn oni rajtis edzinigi ekde la aĝo de 15. Post la jaro 1864 oni rajtis mem decidi, kiun elekti kiel edz(in)on. Okazis tamen pluraj geedzigoj, kiujn oni nun malpermesus kiel "infanaj geedzigoj".

En la pasinto oni malofte rajtis elekti sian paron. La parencaro decidis pri multo, malpermesis ekonomie malavantaĝajn kaj malrangajn geedziĝojn. Post la jaro 1911 oni rajtis edzinigi junulinon antaŭ ol ŝi havis 17 jarojn, sed tamen oni konsideris pli taŭgaj la aĝojn 20–25 por junulinoj kaj 25–30 por junuloj. Se junulino restis needzinigita post

sia 25a aĝo, oni mokis ŝin pro ŝia fraŭlineco. Estis kelka tempo, kiam oni devis pagi specialan imposton, se oni ne fondis familion.

Por gejunuloj ne estis facile renkonti aliajn gejunulojn. En diservoj, festoj, kunlaboraj talkooj (najbarhelpo) oni povis vidi iun, kiu vekis intereson, plaĉis.

Laŭ la fluo de la tempo la edzi(in)ĝaj aĝoj plialtiĝis. Nuntempe gejunuloj volas esti liberaj, studi, vivi sian vivon sen infanoj kaj familiaj devoj. Kelkaj virinoj eĉ deziras infanon sed ne edzon. La edzo ofte tro laborigas la edzinon, se li kondutas en la malnova maniero, kie la edzino sola zorgu pri

la hejmo kaj infanoj. Malpli kaj malpli da homoj nun oficiale geedziĝas, ili nur ekloĝas kune. Tiam ili ne bezonas timi divorcon. Kelkaj paroj fiksas seruron en la relon de iu ponto, imagante ke tio eterne tenos ilin kunaj.

La geedziĝojn de samseksamaj paroj en Finnlando oni permesas ekde 2017. En tiu

jaro edz(in)iĝis 554 samseksamaj paroj. Tamen ne jam ĉiuj pastoroj akceptas nupti ilin laŭ la kristanaj kutimoj. Pli kaj pli da homoj vivas solaj.

En 1894 samseksamo estis kriminaligita kaj en 1971 tio estis malkriminaligita. Ĝis 1981 samseksamo estis konsiderata malsano.

El la londona E-klubo- artikolo pri E-lernado

de Martin Ptasiński

Ĉio komenciĝis per Esperanto-libreto en malsanulejo

Estis somero de 2004. Ege bela kaj suna somero, kiu fariĝis vivdecida por mi. Mi tiam laboris kiel civilservanto en ofico de germana malsanulejo. Kaj la deĵoroj dum semajnfinoj, precipe la posttagmezaj dimanĉaj deĵoroj dum sunaj juniaj tagoj, estis terure enuaj, ĉar nenio vere grava okazis kaj la telefono averaĝe sonoris nur du fojojn dum la tuta dimanĉa posttagmezo. Mi do despere serĉis okupiĝon. La tiaman intraretan servon de la malsanulejo mi jam konis parkere, do devis helpi iu bona libro, prefere iu lernolibro pri lingvo, ĉar lerni lingvon dum enuega deĵoro ja estas bona ideo por ne endormiĝi malantaŭ la skribotablo.

Mi memoris, ke mia patrino dum mia infaneco iam menciis Esperanton, kaj mia instruistino de la germana en baza lernejo iam en la 90-aj jaroj prezentis ĝin al ni dum iu lasta antaŭferia leciono. Mi do mendis etan lernolibron pri Esperanto, kies aŭtoroj promesis, ke post studado de la libreta enhavo – entute nur 127 paĝoj, inkluzive vortareto – oni kapablos skribi leteron en Esperanto. Mi do akceptis tiun veton – kaj la aŭtoroj venkis. La somero 2004 do iĝis la somero de mia esperantistiĝo. Kaj tio havis grandan influon al mia ankoraŭ juna vivo.

Mia nomo estas Martin Ptasiński, mi estas (trinacia pola-soraba-germana Esperanto-)instruisto kaj ekde januaro



2025 mi estas unu el la gvidantoj de la Esperanto-kursaro ĉe la Londona klubo. Mia kariero kiel Esperanto-instruisto komenciĝis en 2013. Tiam mi mem estis studento de komputiko en altlernejo de la germana urbo Wiesbaden, kaj tie mi havis la ideon kunigi mian tutan kuraĝon kaj oferti Esperanto-kurson por miaj kunstudentoj. La lingva fakultato de la altlernejo entuziasme akceptis mian proponon, la kurso estis ege sukcesa (kun 12 studentoj!) kaj tio tiel motivigis min, ke mi decidis enskribiĝi en la kursaron pri **Instruista Trejnado de Esperanto en la universitato de Poznano**. La decido sekvi la vojon de lingva didaktiko influis la pason de mia vivo: mi forlasis la komputadon (mia entuziasmo pri ĝi fakte perdiĝis jam dum la studado...) kaj decidis daŭrigi mian studadon de lingvoj.

Mi ekstudis slavistikon, kaj mian studadon de slavistiko mi financis per instruado de slavaj lingvoj kaj Esperanto en popola altlernejo de Frankfurto. **Hodiaŭ mi estas ŝtate dungita**

instruisto de la soraba, pola, ĉeĥa – kaj de Esperanto.

La poloj kaj soraboj ofte diras, ke ne ekzistas malbonaĵo, kiu tamen ne enhavus ion bonan. Eble la bonaĵo de KOVIM-pandemio estis la fakto, ke hodiaŭ la instruado – ne nur de Esperanto – estas pli facile alirebla al ĉiuj, ĉar ĝi pli ofte okazas per la interreto. Precipe por la Esperanta komunumo tio tre gravas, ĉar tio ne nur helpas "esperantistigi" novajn homojn, sed ĉar ĝi ankaŭ donas eblecon al la disa Esperanto-parolantaro en la mondo eliri la lingvan izoladon.

Esperanto ekde la komenco de la interreto estis pionira pri perreta instruado, oni nur pensu pri lernorimedo kiel **Lernu.net**, kiun mi flankparole dirite ankaŭ mem uzis por perfektigi post mia esperantistiĝo en 2004.

En Frankfurto mia Esperanto-kurso estis ankaŭ pionira: en majo 2020, kiam en Germanio regis striktaj KOVIM-mezuroj, sed ankoraŭ ne ekzistis rimedoj por retinstruado, oni demandis min, ĉu mi pretus oferti mian jam delonge planitan Esperanto-kurson kiel retan kurson – la unuan tian kurson en la historio de la plej granda germana popola altlernejo!

Kompreneble mi akceptis, ankaŭ tiu kurso iĝis granda sukceso, kaj tiel Esperanto pavimis la vojon al la reta kursaro de la Frankfurta popola altlernejo. Oni do ankaŭ povus diri, ke mi ankaŭ estas pioniro pri retinstruado, almenaŭ en Germanio.

Ŝajne mi intertempe jam estas sufiĉe konata instruisto en Esperantujo, **ĉar en pasinta**

Miaj komentoj: Martin vere havas spertojn de pluraj landoj. Pri la **soraba** mi devis gugli por trovi kie oni parolas ĝin. Nun mi scias – la soraba estas indiĝena lingvo, parolata de ĉirkaŭ 60 000 homoj, loĝantaj en la orienta parto de Germanio, proksime al la pola

decembro la Londona klubo kontaktis min kaj demandis, ĉu mi pretus gvidi retkurson por progresintaj parolantoj.

Precipe plaĉis al mi la ideo gvidi kurson por progresintoj, kaj mi senhezite akceptis. Mi konscie ne diras, ke mi *instruas* en mia Londona retkurso, sed ke mi *gvidas* la kurson: la gepartoprenantoj estas jam aŭtonomaj kaj fluaj parolantoj, ili ne volas instruadon de io nova, sed enprofundiĝon en la sekretojn de jam konata lingvo, kiu por multaj de ili jam estas firma parto de ilia vivo kaj identeco.

En nia kurso, kies nivelo estas B2–C1, ni ekzemple parolas pri sinonimoj kaj antonimoj; ni faras tipe esperantajn vortludojn, kie ni konsciiĝas pri la diferenco inter *diet-o* kaj *di-et-o*; ni legas satirajn tekstojn, ekzemple pri la deksepa regulo, aŭ ni per ekzercoj prepariĝas por C1-ekzameno.

Ŝajnas, ke la kurso plaĉas ne nur al mi, sed ankaŭ al la gepartoprenantoj, ĉar aktuale jam daŭras ties kontinuiĝo. Interesa evoluo estas, ke la kursenhavo ofte estiĝas spontanee. La kursmaterialoj servas fakte kiel katalizilo, kiu instigas je aktiva diskutado en la kurso kaj inter la kursanoj. Kaj jen ankaŭ tio, kio igas la kurson tiel valora: Esperanto-parolantoj – de Eŭropo, Ameriko kaj Reunio – povas kune esperantumi kaj tiel lingve perfektigi, lerni unu de la alia. Tio estas la granda valoro de tiu kurso, kaj ĝi ankaŭ por mi kiel lingvoinstruisto estas valorega sperto por mia profesio.

/ Martin Ptasiński



landlimo. La lingvo apartenas al la hindeŭropa lingvaro kaj al la okcident-slava grupo de la slava lingvaro. Rimarkinde estas, ke krom la singularo kaj la pluralo ankaŭ ekzistas la dualo.

En la septembra Ora Ĵurnalo, 2022, mi reklamis pri la kursoj de la Londona E-klubo, sed en la sveda. Tiam mi partoprenis konversacian kurson. La instruistoj sidas diversloke. Nia gvidantino troviĝis en okcidenta Usono. Por ŝi estis mateno kiam por mi estis vespero.

Mi rekomendas la kursojn de la londona e-klubo. Vi renkontos homojn el diversaj landoj.

Dankon Martin pro tre interesa kurso!

/Siv Burell



Jen bildo pri la ĉeestantoj la 2an de junio en la kurso de Martin.

Om radio på esperanto på nätet

av Inga Johanson

Här följer några länkar till vad man kan lyssna på när det gäller radio.

1) Pola Retradio

<https://pola-retradio.org>

De sänder var 5:e dag. Sändningen varar strax under en halvtimme. Man kan också höra musik på esperanto.

2) Varsovia Vento

<https://www.podkasto.net>

De sänder med längre mellanrum – under 2025 har det varit 3 podstar: nr 183 februari – 3 avsnitt vardera en halvtimme, nr 184 mars – 3 avsnitt vardera en dryg halvtimme, nr 185 april – 3 avsnitt ca en halvtimme var.

Även här finns också musik – t.ex Kajto och Martin & la Talpoj.

3) Esperanto Retradio

<http://esperantaretradio.blogspot.com>

Redaktören sitter i Österrike och här kan man läsa samtidigt som man hör. En ny programpunkt nästan varje dag och olika längd. Det finns något för de som verkligen vill öva sina kunskaper.

4) Från Australien Radio 3zzz

<https://www.3zzz.com.au/shows/esperanto>

I maj 2025 var det 3 utsändningar 5/5, 12/5, 19/5. Utsändningen varar en dryg timma.

5) Radio Havano Kubo

<https://www.youtube.com/@mariolazaroruizkarell3058>

I maj var det tre utsändningar 4/5, 11/5, 18/5. Utsändningen varar en halvtimme.

6) Vill man lyssna på musik när som helst så finns Muzaiko

<http://fluo.muzaiko.saluton.dk:8000/radio.mp3# MuzikoEsperanta>

7) Podcast från ön Madagaskar – Aminda Radio

<https://amindaradio.wordpress.com/author/fidilalao/>

<https://www.youtube.com/watch?v=QQXozHievTk>



La pola retransradio pri Ora Ĵurnalo

En la 1396-a E-elsendo el la 20.05.2025 ĉe www.pola-retransradio.org Inga Johansson trovis la jenon:

Hodiaŭ ni enrigardas iujn el la venintaj al la Redakcio gazetoj. Temas pri la elektronikaj eldonoj de la aprila numero de la finna "Esperantolehti", de la majaj numeroj de la jokoĥama "Novaĵoj Tamtamas" kaj de la gotenbarga "Ora Ĵurnalo". Krome ni retrorigardas al la presitaj – marta numero de "Esperanto", la 209-a numero de "Informilo" de Esperanto France-Est kaj la "Konstruado"- kajero de TAKE 2025.

En unuopaj rubrikaj de nia paĝo eblas konsulti la paralele legeblajn kaj aŭdeblajn tekstojn el niaj elsendoj, kio estas tradicio de nia Redakcio ekde 2003. La elsendo estas aŭdebla en jutubo ĉe la adreso: <https://www.youtube.com/results?q=pola+retransradio&sp=CAI%253D> I.a. pere de jutubo, konforme al individua bezono, eblas rapidigi aŭ malrapidigi la parolritmon de la sondokumentoj, transsalti al iu serĉata fragmento de la elsendo. /Siv



Esperanto por mi – 16 esperantistoj portretitaj de Helga Plötner

Mi, redaktanto **HORI Jasuo** (japana revuo), unuan fojon renkontis Helga-n dum la 100-a UK en Lille, Francio, en 2015.

Post tio, ni komencis korespondi. Ŝi estas krajona portretisto, kaj ŝi ofte sendis al mi portretojn de esperantistoj.

Dume mi pripensis fari el ili libron, kaj en julio 2020, ni publikigis ŝian unuan libron,

"Esperanto por mi – 16 esperantistoj portretitaj de Helga Plötner".

Mi pensis, ke tio estas la fino, sed Helga plu volis desegni, do ankaŭ mi decidis sekvi ŝin kaj publikigis la duan libron fine de tiu jaro.

Tiam, ne nur Helga, sed ankaŭ mi, sentis, ke tiu eldono estos grava por la movado. Ni komencis publikigi po du jare. La oka volumo estis publikigita en aprilo de ĉi tiu jaro, kaj ni nuntempe laboras pri la naŭa.

Ĉiu volumo enhavas portretojn de 16 homoj, duone viroj kaj duone virinoj, kaj esee, kiun ĉiu verkis, temante pri **"Mi kaj Esperanto"**.

En ok volumoj, entute aperis 128

esperantistoj el la tuta mondo kiel


"Biografio de esperantistoj en la 2020-aj

jaroj". La eldonado estis tiel altetaksita, ke Helga estis premiita de UEA pro ŝia "elstara agado" antaŭ du jaroj.

Ĉi tiu 8a volumo prezentas homojn el Kroatio, Koreio, Japanio, Bulgario, Germanio, Brazilo,

Meksiko, Tanzanio, Porto-Riko, Albanio kaj Pollando. Sube estas la parto de la

antaŭparolo verkita de Helga por ĉi tiu volumo.



Mi, nun 80-jara handikapulino kun kronikaj doloroj kaj problemegoj, sukcesis portreti kun kuraĝa, forta VOLO ankaŭ por tiu ĉi 8a libro en BONFIDO, KREDO, AMO, ESPERO kaj ĜOJO. ESPERANTO VENKU IAM TUTMONDE por ke unu komprenu la alian en bona etoso! Estu nepre PACO, PACO, PACO tutmonde!

Helga

Volumoj 1 ĝis 3 estas elĉerpitaj, sed ankoraŭ haveblas ekzempleroj de la postaj volumoj. Ili estas malmultekostaj, po 5 eŭroj, do mi esperas, ke vi aĉetos ilin ĉiujn kune.

A4-formato, 16 paĝoj, koloraj. Ankaŭ estas ŝia alia libro "Mia pentrista vivo – Por Esperanto kaj por Paco" (15 eŭroj).

Kontaktu Libroservon de UEA:
libroservo@co.uea.org /Siv

Fleming kaj Churchill – rakonto kiu fakte okazis kaj tamen sonas kiel fabelo

En sia propra arkivo trovis kaj esperantigis Josef Kříž, Ĉeĥa respubliko

Lia nomo estis Fleming kaj li estis malriĉa skota farmisto. Foje, provante zorgi pri sia familio, li aŭdis krion por helpo el proksima marĉo. Li tuj lasis sian tutan ilaron kaj rapide kuris al la marĉo. Tie li trovis knabon timigita ĝismorte ĝistalie profunde en malseka nigra koto. La knabo kriis kaj provis liberigi sin. Farmisto Fleming savis la knabon de malrapida kaj terura morto.

La sekvan tagon, belega kaleŝo alveturis al la bieno kun nobla, elegante vestita viro, kiu eliris el la kaleŝo kaj prezentis sin kiel la patro de la savita knabo.

"Mi ŝatus vin repagi, ĉar vi savis la vivon de mia filo!", diris la nobelo.

"Sed mi povas akcepti neniun monon por mia ago, ĝi estis mia devo, kion ja ĉiuj farus."

En tiu momento, la filo de la farmisto alproksimiĝis al la pordo de la domo kaj aŭskultis kun intereso kio okazis.

"Ĉu tiu knabo, kiu rigardas nin tiel, estas via filo?", demandis nobelo.

"Jes!", la farmisto respondis fiere.

"En tiu kazo, mi havas grandaniman sugeston por vi. Permesu al mi havigi al via filo la saman edukadon, kiun mia filo ricevas. Se li estas sama kiel vi, mi ne dubas, ke li kreskos en viron, pri kiu ni ambaŭ fieros."

Kaj la farmisto tiun oferton akceptis.

La filo de la farmisto Fleming frekventis la plej kvalitajn lernejojn kaj post iom da tempo finis siajn studojn en la Medicina fakultato de la Hospitalo Saint Mary en Londono. Li fariĝis fama sciencisto tutmonde konata pro sia

revolucia malkovro en la kuracado de infektoj – penicilino.

Kelkajn jarojn poste, la filo de la nobelo, savita de morto en la marĉo, malsaniĝis je pulminflamo. Kaj kio do savis lian vivon? Nu ja, penicilino!



*Alexander Fleming
(1881–1955)*

Kia nomo de tiu nobelo estis? Sinjoro Randolph Churchill.

Kaj kia nomo de lia filo estis? Sinjoro Winston Churchill.



*Winston Churchill
(1874–1965)*

Ekzistas multaj biciklaj konkursoj en Ostrogotio

Det finns många cykeltävlingar i Östergötland

de Ingegerd Granat



Ni aŭtovojaĝis hejmen de Mjölby kaj ni volis preni kelkajn malgrandajn vojojn anstataŭ la aŭtovojon E4. Kaj, nur imagu, la 7-an de junio,

Vi var på biltur hem från Mjölby och vi ville åka lite småvägar istället för E4:ans motorväg. Och, tänk just den 7:e Juni hamnade vi mitt bland cyklar av allehanda slag.

Man hade ett jättestort evenemang, med flera tävlingar i en och samma. Kontroller och flaggvakter gjorde sitt jobb. Trupp efter trupp dök de upp längs vägen med färgglada kläder.

Det var loppen ”Halvättern 150 km, Tjevvättern 100 km och Vätternrundan 100 km som gick av stapeln. Det går inte att förneka att det fanns ett gott mått av festglädje.

Vad vi kunde se deltog alla sorters människor på allehanda cykelfordon.

Vad är sommar om inte detta, men man kan inte förneka att det blev trångt på småvägarna i Östergötland.

ni finis meze de bicikloj de ĉiaj specoj kaj modeloj.

Ili havis grandegan eventon, kun pluraj konkursoj. Kontrolistoj kaj flaggardistoj faris sian laboron. Grupo post grupo aperis laŭlonge de la vojo kun buntaj vestaĵoj.

La vetkuroj "Halvvättern" 150 km, "Tjejevättern" 100 km kaj "Vätternrundan" 100 km okazis. Ne eblas nei, ke estis sufiĉe da festa ĝojo.

Laŭ tio, kion ni povis vidi, ĉiuspecaj homoj partoprenis sur ĉiuspecaj biciklaj veturiloj.

Kio estas somero se ne ĉi tio, sed oni ne povas nei, ke fariĝis tro da homoj sur la malgrandaj vojoj en Ostrogotio.



Informo pri kursoj en Greziljono

de Bert Shumann

Karaj amikoj. Jen la somera programo de via Esperanto-kastelo Greziljono en la franca urbo Baugé-en-Anjou:

junio-30 / julio-10 9-a Maratona Esperanto-kurso kaj IEK kun Dennis Keefe, Nedeljka Ložajić, Frank Lappe

junio-30 / julio-07 89-a IKBE (Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj) de LIBE

julio-11 / 20 11-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (franclingve)

julio 21 / 31 46-a Renkonto de Esperanto-Familioj REF kaj 15-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj

aŭgusto 09 / 16 98-a Kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda)

aŭgusto 24 / 29 6-a Verda Naturisma Semajno kun INOE, Thierry Spanjaard, Didier Loison

Kontaktu nin por pli da informoj:
kastelo@gresillon.org – 06 51 24 24 23

Aliĝu en <https://gresillon.org/al?lang=eo> – eblas peti prezredukton

/ Salutas Bert



Naŭ gotenburganoj partoprenis en *Esperanto sur la strando, 2018*



Artikolo pri Esperanto sur la strando en 2018 troviĝas en Ora Ĵurnalo numero 11 (www.esperanto-gbg.org). Nun nova ebleco en 2025:

Instigitaj de okazaĵoj de nuntempaj tempoj ni volas tuŝi la temon de enmigrado. Gdańsko kiel havena urbo jam de multaj centjaroj estis la loko, en kiu renkontiĝis homojn el diversaj landoj. Multajn decidis moviĝi ĉi tien. Tio kreis ne nur lingvajn defiojn.

Dum inaŭgura prelego profesorino Koutny rakontos pri interkultura komunikado. Sabate ni prezentos al vi pri Menonitoj – enmigrintoj el Nederlando kiuj ekde XVI jarcento vivis apud kaj en Gdansk. Ni planas ekskurson ekster Gdansk.

Jam aliĝis esperantistoj el Pollando, Germanio, Aŭstrio.

Aliĝkotizo: 100 zł

Kiel aliĝi: skribu al nia retpoŝto: torentosopot@wp.pl

ni bezonas:

- vian nomon kaj familian nomon
- de kie vi venos al ni
- ĉu vi konsentas ke ni publikigu vian nomon sur la listo de partoprenantoj

- ĉu vi intencas partopreni dimanĉan ekskurson?
- ĉu vi volas dormi en studenta domo?

Tradicie ni rekomendas tranoktojn en studentaj domoj de Gdanska Technika Universitato ĉe la strato Wyspiańskiego en Gdansk – kvartalo Wrzeszcz (pli malpli 15 minutojn piede de la stacidomo Gdańsk-Wrzeszcz, ĉe kiu haltas ĉiuj trajnoj).

(Prezo: 80 zł / lito / nokto – pagata surloke).

Dimanĉa ekskurso estos krome pagata, prezo estos anoncita pli proksime al septembro.

Manĝoj ĉiuj partoprenantoj prizorgas mem.

Jen la ligilo al nia retpaĝo:

<https://sites.google.com/view/triurbo/esls-2025?authuser=0>



Programo

Ĵaŭdo – SOPOT

17:00 – Klubejo Torento en SOPOT, str. Armii Krajowej 98 – akceptejo

18:00 – Prelego de **Piotr Szatkowski**: "Lingva diverseco de Orienta Pomerio"

foto-ekspozicio: "ARKONES nur en nia memoro"

Vendredo – SOPOT

10:00 – La inaŭguro de ESS ĉe SOPOTEKA – Plurmedia Kulturgalerio, str. Kościuszki 14

- Prelego de **prof. Ilona Koutny** (en Esperanto) "Interkultura Komunikado"
- Diskuto

11:30 – "Kiel vi fartas en nia lando" – la rezultoj de la demandaro inter enmigrintoj

Tempo por tagmanĝi

16:00 – Vizito en la Arbarherbejo de Esperantistoj ĉe Esperanta Kverko kaj Memorŝtono

Programo ĉe "Muziko kaj Danco"

Sabato – GDANSKO

10:00 – Menonita Tago: Prelego en la Najbara Domo – Biskupia Górka, str. Biskupia 4

13:00 – Promeno laŭ la migrovojo de la verkoj de la Familio van den Blocke en Gdansko, kalkulante heraldikajn ŝton-leonojn laŭvoje

Tempo por tagmanĝi

17:00 – Renkontiĝo kun **prof. Giorgio Silfer** en la biblioteko ĉe la Eŭropa Centro pri Solidareco (ECS) Pl. Solidarności 1

"La Pakto por la Esperanto-Civito, 25 jaroj de atingoj."

Dimanĉo – ŻUŁAWY

Vojaĝo al la depresi-regiono Żuławy (aparta aliĝo al la ekskurso)

Por plia aŭskultado pri gravaj aferoj

Rafaela Urueña en 83a Hispana Esperanto-Kongreso: Esperanto, mia dua lingvo!

La ligilon sendis Josef Kříž, Ing.



Porpaca agado en Unuiĝintaj Nacioj – Rafaela Urueña – <https://youtu.be/9ipRuasDPD0>

Elektitaj 5 komitatanoj B de UEA por mandato 2025–2028

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA pere de "Informilo", Ĉeĥio:

Komitatanoj B reprezentas la IM-ojn (Individuaj Membroj en UEA) en la Komitato, la supera organo de la Asocio.

La novaj komitatanoj B estas José Antonio del Barrio el Hispanio, Marija Belošević el Kroatio, François Lo Jacomo el Francio, Wu Guojiang el Ĉinio kaj **Espoir Kasati el D.R. Kongo**.

La nove elektitaj komitatanoj B ekoficos dum la malfermo de la ordinara kunveno de la Komitato dum la 110-a Universala Kongreso en Brno, Ĉeĥio.

UEA gratulas al la elektitoj kaj deziras al ili aktivan kontribuadon al la Komitato kaj la Asocio.

Kaj ni en Gotenburgo, kiuj en 2024 renkontis Espoir en Svedio diras:

Gratulon, Espoir!



La Zoom-kunvenoj de Librorondo ekde aŭgusto 2025

Ni decidis elekti Anna de Verdaj Gabloj, proponita de Rianne Sanders, Nederlando. Mi legis ĝin antaŭ multaj jaroj kaj ŝatas ĝin – eĉ se mi ne memoras multon, nur la agrablan etoson.

Oni ja jam povus cerbumi pri libro post Anna de Verdaj Gabloj.

Jen kelkaj proponoj:

Dum la restado sur Öckerö Anita Dagmarsdotter donis al ni alian idéon. En vico ĉiu povus preni pecon de libro aŭ tutan artikolon kaj sendi al la aliaj. Do, ĉiu povas legi ĝin antaŭ la Zoom-kunveno. La proponinto gvidos la diskuton.

Laŭ mi tio estas la sama ideo, kiun havas Marteno – Martin Ptasinski – kiu donas al la partoprenantoj tekston kies enhavon, stilon, vortfaradon, k.t.p. ni diskutas (legu lian artikolon en ĉi tiu numero!).

– Mi ĵus legis "**Kredu min Sinjorino!**" kaj ege ŝatis ĝin. Mi baldaŭ eklegos "**El verva vivo ĵurnalista**". Mi esperas ke ĝi simile bonos!



Mi volonte partoprenos la Librorondon en 2025.

Mi ankaŭ havas jam du proponojn pri legado post Orm la Ruĝa. "Anna de Verdaj Gabloj" kaj "La edzino de l'tempvojaĝanto" (kiu aperos la 15-an de decembro).

/Rianne

.... kaj jen pensoj de Marteno:

– Rilate al via prilibra demando: mi pensas, ke la ideo de Rianne estas ege bona. Se vi tamen volas havi proponojn:

1. **Mil Naŭcent Okdek Kvar**/George Orwell (malavantaĝo: la romano estas tiom konata, ke verŝajne kelkaj legis ĝin jam; krome ĝi povas kaŭzi tro politikajn diskutojn).
2. **La portreto de Dorian Gray**/Oscar Wilde.
3. **Iu ajn verko de István Nemere!** La avantaĝo estas, ke temas preskaŭ ĉiam pri esperantaj originaloj. Nemere ĉiam pritraktis

aktualajn sociajn problemojn/okazaĵojn en siaj verkoj kaj havas vastan gamon da ĝenroj (sciencfikcio, krimromanoj, dramoj, ktp.). El liaj verkoj mi povas ekzemple rekomendi "**La Fermita Urbo**", "**Serpentoj en la Puto**" aŭ "**Pigre Pasas la Nokto**" – depende de tio, kiun ĝenron oni preferas.

Amikan saluton el suna Frankfurto,

Marteno

Do, restas nur ekscii: kiuj volas legi Anna de Verdaj Gabloj kun ni en la gotenburga esperanta klubo. Mi nur bezonas vian nomon kaj retadreson por sendi al vi informon pri la aktualaj paĝoj legendaj. La Zoom-ligilon mi sendos kelkajn tagojn antaŭ la kunveno, kiu okazas la lastan dimanĉon monate je la 17a horo mezeŭropa tempo.

Estas loko por novaj partoprenantoj. /Siv

siv.burell@gmail.com

Fine io por la humoro...

Maljuna paro eniras MacDonald's kaj aĉetas hamburgeron por dividi inter si.

Kamiona ŝoforo vidas tion kaj supozas ke ili estas malriĉaj kaj proponas sin aĉeti unu ankaŭ al la sinjorino.

– Ne dankon, ni interdividas ĉion, la viro diras.



Iom poste la sinjorino

ankoraŭ ne komencis manĝi, kaj tiam la ŝoforo diras al ŝi:

– Sed ĉu mi tamen ne aĉetu hamburgeron al vi?

La sinjorino afable:

– Ne dankon. Ni dividas ĉion inter ni.

– Sed kial vi ne jam manĝas?

– Mi atendas por la dentoj, la sinjorino diras.



Estis iam testudo kiu grimpis sur arbon. Post pluraj horoj da grimpado ĝi atingis la pinton. Tiam li ĵetis sin en la aeron kaj svingis fluge la antaŭkrurojn por fine kraŝe surteriĝi. Sed la etulo ne rezignis, li regrimpis kaj reĵetis sin kaj kraŝis. En apuda arbo du birdoj sidis kaj rigardis la malsukcesojn de la etulo. Fine unu diris:

– Karulo, ĉu ne estas pli bone rakonti al li ke li estas adoptita?



Solve de la enigmoj en p. 3: kajmano, iksodo, diurno, kolbaso, konturo.